

Numero: 269
Oktobro: 2014.

22-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kapošvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Homo kun lernolibro

En iu tago irante sur la strato kontraŭ mi viro venis portante lernolibron. Ĝi estis lingvo-lernolibro.

Li lernas lingvon. Kun la libro estis ankaŭ kajeroj kaj vortaroj. Li serioze lernas lingvon.

Kiun lingvon? – Kompreneble la anglan. Nuntempe ĉiu lernas tiun ĉi lingvon. Konate, en la dudekunua jarcento ĝi estas nur la unusola lernebla lingvo. Alian kial lerni? Ekzemple, lerni lingvon de iu malgranda nacio ne estas moda. Eĉ kiu lernas bulgare, pole, rumane ktp. tiu estas ridinda. Nun jam ĉiu lernas la anglan lingvon. Ĝi estas la dua lingvo de la homaro – diras snoboj – se vi ne scias tiun ĉi lingvon, tiam vi ne estas moderna homo.

Oni lernas la anglan lingvon. Homamasoj komencas lerni ĝin en ĉiu jaro. Ne indulgante tempon kaj monon oni ne deziras ŝajni malmodernaj.

Oni elpagas grandajn monsumojn por la lingvolernado. Krome oni aĉetas la plej multekostajn lernolibrojn.

Tamen la lingvoscio estas plorinda. Se oni devas ekparoli oni nur mutas. Oni ne kuraĝas malfermi la buŝon, se oni renkontiĝas kun eksterlandanoj. Oni trankviligas sin: „Mi estas ankoraŭ komencanto. Mi ankoraŭ ne scias perfekte la lernatan lingvon.”

Terure!

Oni timas de la fiasko. Oni hontas ekparoli en la lingvo. Tiuj ĉi homoj neniam kuraĝas uzi la lernatan lingvon.

Bona afero estas la lingvoscio. Ĉiu homo devus scii almenaŭ unu fremdan lingvon. Ĉiu homo devus scii lingvon internacian, neŭtralan, kiu ĉies lingvo kaj ĝi apertenus al neniua nacio.

Homo, kiu iras sur la strato portante lernolibron, lernu ankaŭ la anglan, sed ne forgesu, en la mondo ekzistas alia lingvo. Se ĝin vi ellernus kaj ĉiu ellernus sur la tuta terglobo, tiam eble la internacia komunikado estus pli agrabla. Vi ne devus timi, ke vi estos priridita, se hazarde malĝuste prononcas iun vorton aŭ frazon.

Homo! Portu ankaŭ Esperanto lingvo-lernolibron kaj lernu ankaŭ Esperanton!

-Redakantano-



En la parko

Mi sidas en la parko sur benko. Estas varme kaj agrable ekripi sub ombra arbo. Neatendite du etaj infanoj venas al la najbara benko, kiu estas tute proksime al la mia. Mi klare aŭdas ilian babiladon. Ili pepadas, kiel birdoj.

-Se mi estos plenaĝulo mi scios multe da lingvoj. Se mi vojaĝos eksterlanden, tiam mi ĉie povos kompreni min. – diras la blonda knabeto kaj liaj grandaj, bluaj okuloj feliĉe ekbrilas. – Mia patro diris, ke nuntempe oni ne povas ekzisti sen lingvoscio. Kiu ne parolas almenaŭ du – tri mondlingvojn, tiu estas perdiĝinta. Ĉie oni bezonas la lingvoscion. Sen fremdaj lingvoj, vi ne trovos laboron eksterlande. En la venonta semajno mi jam komencos lerni unu lingvon en la infanĝardeno. Poste la lernadon mi daŭrigos ankaŭ en la lernejo. Mia patrino promesis, krom la lerneja, devigita fremda lingvo mi lernos ankaŭ alian lingvon ĉe privata lingvoinstruisto. Dum la tuta vivo oni devas lerni lingvojn. Eble ankaŭ mia avo eklernos tion kun mi. Li estis maldiligenta, kaj en la lernejo li ellernis neiun fremdan lingvon. Sed nun li deziras lerni kun mi. Li diris, ke ni baldaŭe interparolos en la lernata lingvo, kaj tiel ni ekzercos ĝin. Mi jam ekscitite atendas la lingvolernadon. Imagu, mi povos paroli kun eksterlandanoj. Kiom bonege estintus ĉi somere, kiam mi estis en Italio kun miaj gepatroj, se mi estus parolinta iun mondlingvon. Ĉu ne? Sed en la sekva jaro mi jam certe scios. Mi povos babiladi kun la tieaj infanĝardenanoj. Ĉiu homo devus lerni lingvojn. Kiel vi opinias pri ĝi? Ĉu ankaŭ vi lernas iun lingvon? Kial vi rigardas al mi tiom strange? En mia familio ĉiu lernas iun lingvon. Diru al viaj gepatroj, ankaŭ vi komencu lerni! Ĉu en via infanĝardeno oni ne faras lingvokurson por etuloj? Vi povos iri ankaŭ al privata lingvoinstruisto. Mia patro konas tian personon. Ĉu vi deziras, ke mi parolu kun mia patro? Certe li scias lian adreson aŭ telefonnumeron. Ne hezitu, ankaŭ vi lernu iun fremdan lingvon!

La alia knabeto ekparolis post iom da pensado:

-En mia familio, ĉiu parolas Esperanton. Per ĝi ni povas kompreni nin en la tuta mondo.

-Ŝaŝa-



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
IV-a

La junulino estis pli bela ol en la kosmoŝipo. Ŝia vizaĝo brilis. Ŝajne la luna atmosfero estis bona al ŝi.

Johano apenaŭ povis ekparoli, kiam li ekvidis ŝin. La revido de la virino estis tre agrabla por li. Li estus trompiĝinta, se li ne povintus renkontiĝi plurfoje kun Elinjo.

Unue ili longe rigardis mute unu la alian. Fine ili ambaŭ feliĉe ekridis. Sekrete li atendis tiun ĉi renkontiĝon, sed tamen nun li surpriziĝis.

-Salut'! – ili salutis unu la alian.

Dume la onklino de Johano malproksime rigardis ilin. En ŝiaj okuloj estis ia mistera lumo, sed tion ŝia nevo ne rimarkis. Io ne plaĉis al la maljunulino. Pro tio ŝi ne iris al la gejunuloj. Ŝi diskrete kaŝiĝis malantaŭ arbusto kaj de tie ŝi rigardis ilin.

Johano proponis al Elinjo, ke ili eksidu sur ŝvebantano benkon. Ŝi akceptis tion.

De sur la ŝvebanta beno estis admirinda la panoramo de la urbo.



-Kiom surprizo, ke ni povis renkontiĝi en tiu ĉi belega parko – komencis Johano. – En la mondo ankoraŭ estas hazardo, ke ankaŭ vi estas tie ĉi. Mi ege ĝojas. Espereble tio ĉi estas antaŭsigno por nia kontakto.

-Ankaŭ mi tre esperas – ekridetis ĉarme la junulino. – De mia ĉefo mi ricevis iom da libertempo ĝis la kvara laŭ la luntempo. Poste en nia kontoro ni havos gravan pritrakton kun la deputitoj de Intergalaksia Asocio.

-Kiom longe daŭros la pritraktado? Se vi konsentas, poste mi invitas vin vespermanĝi en iu animagorda restoracio. Ĉu vi akceptas mian inviton?

-Tre volonte – ŝi respondi. – Sed laŭ mi ĝi daŭros ĝis noktomezo. Hodiaŭ mi ne povos iri al restoracio. Se vi deziras, ni renkontiĝu morgaŭ vespere. Ni renkontiĝu morgaŭ vespere antaŭ la restoracio STELOBRILLO. Ĉu la tempo estas konvena por vi?

-Kompreneble – ĝojegis Johano. – Mi atendos vin antaŭ la restoracio.

Subite Elinjo ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ ŝi serĉus iun.

-Kie estas tiu kara oldulino, kun kiu vi promenis en la parko? Mi ne vidas ŝin. Ĉu ŝi foriris?

-Mi ne scias – ekmiris Johano. – Efektive kie estas mia onklino? Antaŭ nelonge ankoraŭ estis kun mi en la parko.

La parko havis grandan kaj altan turon kaj en ĝia supro estis giganta horloĝo. Ĝi projekciis sur la rozkoloran ĉielon, kioma horo estas.



-Post kvaronhoro estos la kvara – eksaltis Elinjo. – Mi devas rapidi al la kontoro. Mia ĉefo ne ŝatas, se oni malfruas. Bonvolu ne koleri, nun mi devas foriri. Do, morgaŭvespere je la sesa ni renkontiĝos antaŭ la restoracio STELOBRILLO. Ĝis! Fartu bone kun via onklino!

Post la foriro de Elinjo li ekstaris kaj li komencis serĉi la maljunulinon. Kiam li trovis ŝin malantaŭ la arbusto li mire demandis:

-Kara onklino mia, kial vi malaperis? Ni serĉis vin. Kien vi kaŝiĝis?

La onklino ŝajnis tre serioza. Ŝi tute ŝanĝiĝis kaj Johano sentis, ke ŝi ne parolas sincere.

-Mi ne volis ĝeni vin – diris la onklino. – Mia ĉeesto dum via randevuo estintus malagrabla por vi. Mi promenis iomete en la parko kaj mi rigardis la florojn.

-Kial vi ĝenus nin, kara onklino mia? Nia rentkontiĝo estis tute hazarda. Ankaŭ ŝi pasigis duonhoron tie ĉi kaj ni denove renkontiĝis.

-Mi dubas, ke tiu ĉi renkontiĝo estis hazarda – ŝi diris kaj forte ŝi enrigardis la okulojn de Johano. – Mi tre dubas.

Li ne komprenis kial?

(daŭrigota)



Poezio

Esperanta poezio. Ĝi estas vaste konata en la tuta mondo. Nia unua poeto estis mem nia majstro d-ro Zamenhof.

Laŭ mi (kompreneble tio ĉi estas subjektiva) lia plej bona poemo estas: HO MIA KOR'!

Tiu ĉi poemo apartenas al liaj unuaj verkaĵoj kaj ĝi esprimas sinceran timon, kiel akceptas la homaro lian „idon” Esperanton.

Ni ne forgesu, ankoraŭ neniu sciis, ĉu venkos aŭ falos la ideo de la Internacia Lingvo.

Ofte ankaŭ min kaptas tiu ĉi sento, kio luktis en la koro de d-ro Zamenhof.

Tiel legu tiun ĉi grandiozan poemon!

Ho, mia kor'

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
el mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado
ĉu mi ne venkos en decida hor'?
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,
ho, mia kor'!

La espero

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

Pluvo



Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
senĉese, senfine, senhalte,
el ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
are gutoj frapiĝas resalte.

Tra la sonoj de l' pluvo al mia orelo
murmurado penetras mistera,
mi revante aŭskultas, mi volus kompreni,
kion diras la voĉo aera.

Kvazaŭ ia sopir' en la voĉo kaŝiĝas
kaj aŭdiĝas en ĝi rememoro...
Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,
en mi batas konfuzo la koro.

Ĉu la nuboj pasintaj, jam ofte viditaj,
rememore en mi reviviĝis,
aŭ mi revas pri l' sun', kiu baldaŭ aperos
kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis?

Mi ne volas esplori la senton misteran,
mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;
ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas,
al la freŝo la koro min tiras.



Por infanoj



Koketo, kiu defendis la kokinojn

En malgranda vilaĝo vivis maljunulino. Ŝi havis belajn kokinojn kaj unusolan, maldiligentan koketon. Ĝi ne deziris skrapadi en la korto, kiel decas al ĉiu bona koko. Dum la tuta tago ĝi dormetis en la ombro de granda arbo. La maljunulino promesis al ĝi, se ĝi ne pliboniĝos, tiam ŝi forpelos de la domo.

Tio ĉi ne tro interesis la etan beston. Ĝi plu dormis.

La kokinoj mem devis skrapadi, se ili deziris serĉi bongustan vermon kaj alian. Kvankam tiu tasko apertenus al la koketo.



Ankaŭ la maljunulino estis tre malkontenta. Ŝi decidis forpeli ĝin morgaŭ matene kaj anstataŭ ĝi ŝi aĉetos novan en la semajnofina foiro. Sen koko la kokinoj ne povas ekzisti.

Pri tio ĉi la koketo sciis nenion. Ĝi trankvile ripozadis sub la arbo.

Alvenis vespero kaj la kokinoj okupis sian lokon en la kokinejo. Ŝajne ĉio estis en ordo. Ankaŭ la maljunulino ŝlisis la pordon kaj ŝi enlitiĝis. Longe okazis nenio. La horoj pasis trankvile, kiel alifoje.

La vilaĝo silentiĝis. Estis malhela nokto. El la proksima arbaro elvenis la ruza vulpo por serĉi ĉasaĵon.

En la arbaro ĝi trovis nenion. Tiel ĝi devis viziti la kokinejojn de la vilaĝo. Ĉe ĉiu domo timiga hundo gardis. Se vulpo proksimiĝis, la hundoj laŭte komencis bojadi kaj ili forpelis ĝin.

La malfeliĉa vulpo devis serĉi alian kokinokorton, ĉar ĝi jam estis tre malsata. Longe ĝi iradis de domo al domo. Fine ĝi alvenis al la domo de la maljunulino.

Bonsance tie ĉi la vulpo ne vidis hundon. Vere en la najbaro estas granda, timiga domgardanto, sed nun ĝi dormis en la ĝardeno.

La vulpo estis lerta besto. Ĝi facile povis eniĝi la korton kaj ĝi rapide trovis la kokinejon. Ĝi jam de malproksime sentis la odoron de la kokinoj. La ruza besto apenaŭ atendis, ke ĝi povu kapti kelkajn dikajn kokinojn.

En la malhelo la kokinoj vidas malbone kaj ili ne povas rifuĝi de antaŭ la vulpo. Estos facile akiri vespermanĝon – pensis la besto kaj ĝi komencis agi.

Ĝi serĉis la enirejon kaj singardeme malfermis la lignopordeton. Ĝi ne estis malfacila laboro, ĉar la maljunulino forgesis ŝlusi ĝin per seruro. Dum kelkaj sekundoj la pordo malfermiĝis. La vojo estis libera en la kokinejon.

La kokinoj panike vekiĝis el la sonĝo kaj volis rifuĝi. Sed tio ne sukcesis pro la malhelo. Ili tien – reen kuradis kaj timege kriegadis:

-Help! Help! Tie ĉi estas la vulpo kaj ĝi deziras manĝi nin.



Ankaŭ la koketo vekiĝis kaj tuj ĝi sciis, ke ĝi devas fari ion ĝis la vulpo forportos la kokinojn. Ĝi kompatis ankaŭ la maljunulinon, ĉar ŝi estas tre malriĉa kaj krom la gekokoj ŝi ne havas alian havaĵon.

Kion fari? – ĝi cerbumis. – La koketo ne havis multe da tempo. Ĝi tuj elsaltis el la kokinejo kaj kuregis al la fenestro de la maljunulino, kie ĝi laŭtege ekkokerikis.

Unue la maljunulino ne sciis, kio okazis. Ankoraŭ ne povas esti mateno. Ja, estas malhele. La koketo kokerikis plu.

Ne pasis multe da tempo kaj ŝi komprenis, ke io okazis ĉirkaŭ la kokinejo. Ŝi ekprenis balailon kaj kuregis eksteren.

Ŝi alvenis ĝustetempе, ĉar la vulpo jam volis forporti du belajn kokinojn.

-For de mia domo, fia vulpo! Lasu miajn kokinojn! – ŝi diris kaj ŝi jam forte bategadis la dorson de la vulpo.

Pro la fortaj bategoj la vulpo tiom ektimis, ke ĝi forĵetis la ĉasaĵon kaj ĝi ekkuregis al la arbo.

La du kokinoj saviĝis dank' al la koketo. Matene, kiam la sunradioj denove brilis en la kokinkorto la maljunulino indulgis al la eta heroo kaj ĝi ne estis forvendita en la semajnofina foiro.

-Onklo Adalberto-



NIFOJ

NIFOJ

